

sub la suda kruco ★
marto 2018

ESPERANTO





ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIOJ

Volumo 25[1] numero 130 marto 2018

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio
Redaktistoj: David Ryan, Joanne Johns
Kontaktadreso | esk2@esperanto.org.au

AEA - ESK
G.P.O. Box 2122
Melbourne, Victoria 3001
Australia

Abonoj & Pasintaj Numeroj

Esperanto sub la Suda Krucio estas sendata al membroj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEa).

Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:

AEA | www.esperanto.org.au – info@esperanto.org.au
NZEa | www.esperanto.org.nz – exec@esperanto.org.nz

Kiel kontribui al ESK

Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia kontaktadreso, esk2@esperanto.org.au

Limdato por kontribuoj por la sekva numero

15-a de majo 2018

La redaktoroj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

Por la opinioj aperantaj
en ĉi eldonajo respondecas la aŭtoroj.
Ili ne necese spegulas la opiniojn
aŭ de AEA aŭ de NZEA.

Copyright © 2018 AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj
ISSN 1038-9380.

SUR LA KOVRILO: Juna Pat Palmer sidas sur elefanto, ĉe la bestoĝardeno de Londono, 1938

- 
- 5.** Vizitinda insulo: King Island
 - 7.** 2084
 - 9.** Ekskurso al Borobudur
 - 12.** Lingvaj humuraĵoj
 - 15.** Ekskurso al la natura parko de Monto Merapi
 - 18.** La diferenco inter la bahaa kredo kaj aliaj mondaj religioj
 - 21.** Fine ĉokolado!
 - 23.** Surpriza eta lando: Malto
 - 25.** Kial mi iĝis esperantistino kaj kial mi amas verki kantojn en Esperanto
 - 28.** Literatura ŝtormo en Esperantujo: la eldono de 'Hamleto' de Len Newell
 - 29.** Forlaso

marto, du mil dekok

Bonvenon al nova jaro. Kio atendas nin en 2018? Mi volis komenci verki komentojn pri teruraj aferoj kiuj eble okazos, ekzemple militoj kaj tertremoj. Tamen, ni ne pensu negative. Ni ĝuu la vivon: 'viva la vida' kiel oni diras en la hispana, aŭ en la fama kanto de Coldplay. Kiel vi ĉiuj, mi maljuniĝas, sed mi ne plendas ĉar mi povas fari nenion por kontraŭi tion. Mia celo en la vivo estas ĝui ĉion dum eblas. Ekzemple, mi ŝatas vojaĝi; tial, mi vojaĝas nun kiam estas relative facile por mia korpo.

Vi legos en ĉi tiu numero artikolon mian pri vizito al Malto. Mi ankaŭ vizitis aliajn landojn en suda Eŭropo en decembro/januaro, kaj en Hispanio mi renkontis esperantistojn en Barcelono. Mi ne intencis esperantistumi dum miaj ferioj, sed mi ricevis mesaĝon pere de Amikumu pri kunveno de la loka klubo. La renkontejo ne estis tro for de mia hotelo, kaj pro tio mi ĉeestis kunvenon kun amikemaj samideanoj kaj ni babilis pri diversaj aferoj. Dum mia vojaĝo mi ankaŭ ricevis mesaĝojn de esperantistoj kiam mi estis en Maroko kaj Italio sed ni ne troviĝis en la samaj urboj kaj, pro tio, ni ne renkontiĝis. Kredu min kiam mi diras ke mi ne havas akciojn en la firmao de Amikumu. Tamen, mi ĝoje laŭdas kaj propagandas pri Amikumu kiu, en mia opinio, estas ege utila ilo por faciligi kontaktojn inter esperantistoj. Mi konas multajn esperantistojn en

Nov-Zelando kaj Aŭstralio kaj mi ne vidas vin en Amikumu!! Ne prokrastu – konektu vin kun la mondo!

Ĉi-sube estas foto de araba konstruaĵo. Vi kredas ke ĝi troviĝas en araba lando, ĉu ne? Malprave! Ĉi tiu estas foto de pordo en eksa moskeo en Córdoba en suda Hispanio. Dum jarcentoj preskaŭ la tuta nuna Hispanio estis lando sub araba rego kaj Córdoba estis grava centro por la araba/islama kulturo, ĝis la fino de la 15-a jarcento kiam oni forkurigas la arabojn. Tamen, la araboj lasis sian arkitekturon kaj ankaŭ influon sur la hispana lingvo. Mi vizitis Córdoba por renkonti amikinojn kiu estis plumamikino mia kiam mi komencis lerni Esperanton.



Vizitinda insulo: King Island

HEATHER HELDZINGEN (MELBURNO)

Antaŭnelonge mi vizitis King Island (Reĝa Insulo) (1800 enloĝantoj) en la Markolo Bass inter Melburno kaj la nordokcidenta marbordo de Tasmanio. En 1801 la insulo akiris la nomon King Island pro la fakto ke la tiama estro de NSK estis Kapitano Phillip King.

La insulo estas fama pro la bonegaj fromaĝo, bifstekoj, kaj marbestaĵoj kiuj estas eksportataj al aliaj partoj de Aŭstralio kaj eksterlanden.



Unu el la aliaj eksportataj produktoj estas fuko “Bull Kelp Seaweed”, en la latina *Durvillaea Potatorum*. Tiu estas dika marherbaĵo uzata en multegaj aferoj inkluzive la produktadon de manĝaĵoj, industriaj aplikoj, ĥemiaĵoj, ceramikaĵoj, tekstiloj ktp. Post leviĝaj tajdoj, ĝi troviĝas sur la plaĝoj. Oni kolektas ĝin kaj la suno kaj vento sekigas ĝin pretigante ĝin por eksporti ĝin kaj por ŝanĝi ĝin al utilaj produktoj.

Por vojaĝi al King Island oni devas iri per malgranda aviadilo kie oni eĉ rajtas sidi apud la piloto. El la aviadilo oni povas vidi multajn rifuojn kiuj ĉirkaŭas la insulon. Pro la danĝeraj rifuoj, dum la lastaj du jarcentoj, centoj

da ŝiprompiĝoj okazis kun la perdo de pli ol mil homoj. Pro tiuj multaj perdiĝoj da ŝipoj la registaro konstruis tri lumturojn sur la insulo - en la nordo, oriento, kaj sudo. En la nordo estas la Lumturo de Cape Wickham, la plej alta lumturo en la suda hemisfero je 52 metroj. Oni konstruis ĝin en 1861 kaj ĝi ankoraŭ funkcias. Interesa por turistoj estas vizito al Catarau Point kie la ŝipo de tiu nomo sinkis kun la perdo de 400 homoj.

En la komenco de la 19a jarcento franca esplorŝipo La Naturaliste vizitis la insulon kun sciencistoj kaj botanikistoj. Ili vizitis la nun nomatan Marelefantan Golfon kie ili vidis kaj raportis pri la buĉado de multegaj fokoj de anglaj fokĉasistoj. Post nelonge la fokoj estis tute formortigitaj. La sama sorto okazis al la malgrandaj emuoj kiuj loĝis sur la insulo. Oni buĉis dekmilojn da ili kaj ili ne plu ekzistas.





La insulo vere detruatis en la unuaj jaroj de setlado. Mi vidis malnovajn fotojn de grandegaj arboj kiuj kovris la terenon. Oni forhakis 95% da tiuj belegaj arboj kaj nun la insulo estas kovrita de herbaĵoj (bonaj por valabioj kaj bovoj).

La insulo nun allogas vizitantojn por golfludo ne nur el aliaj partoj de Aŭstralio sed ankaŭ el aliaj landoj. En King Island oni trovas du el la plej belaj golfejoj en la mondo. Ili situas apud la

maro, kun ĉie belegaj vidindaĵoj.

Aliaj allogoj estas la multaj plaĝoj kie oni povas kolekti konkojn aŭ fiŝkapti. Pingvenoj ankaŭ estas videblaj je sunsubiro apud la vilaĝo Grassy. Vizitinda estas la tre interesa muzeo en Currie kiu en antaŭaj jaroj estis la domo de la zorgantoj de la lumturo. La lumturoj nun funkcias aŭtomate.

Do, iru kaj ĝuu.



Iam en la proksima estinteco George Orwell (ĉu "Puto de Oro?"), lia vera nomo estis Eric Arthur Blair, verkis pri la estonteco. Tiun verkon li nomis 1984. Ni ĉiuj jam de longe bone scias ke estas ege malfacile antaŭdiri ion ajn, kaj precipe tre malfacile estas antaŭdiri la estontecon!

Nu tiuj, plej verŝajne tre multaj, kiuj ankoraŭ ne atente tralegis lian bonegan verkon, povas nun senti sin ege bonŝancaj ĉar nun sekvos aliaj antaŭdiroj pri la estonteco. Almenaŭ ni povas senti nin certaj ke estonteco venos!

Mi ne parolos pri la tuta estinteco, ĉar mi memoras ne multon el tio kio okazis antaŭ 1932, ĉar tiam mi ankoraŭ ne estis naskiĝinta. Sed tre baldaŭ post mia naskiĝo mi rimarkis ke la planedo sur kiu mi naskiĝis, kvankam ĝi ne estas la plej malbona, laŭ mia opinio certe ankaŭ ne estas la vere plej bona. Sed ankaŭ mi ja estas ĉi tie nur ĉar mi meritas tion!

Estas vere ke estas homaro sur tiu ĉi planedo. Estas ankaŭ bestaro. Kiu el tiuj du aroj estas la plej bona? Multaj homoj opinias ke ni homoj estas la plej bonaj. Sed tio estas ja ilia opinio kaj ĉiuj rajtas havi sian propran opinion eĉ se ĝi ne koincidas kun la mia. Sed pri la bestoj mi ŝatus diri ke mi neniam vidis iujn ajn bestojn kun treege malbelaj uniformoj bruege frapantajn per la piedoj kaj blovantajn trumpetojn eniri la landon de aliaj bestoj kiuj parolas tute alian lingvon ol tiuj aliaj. Mi neniam vidis ilin perforte enirantajn, sen biletoj, sen pasportoj kaj sen vizioj en landon, prefere landojn kun oleo,

kiu ne estas ilia. Mi neniam vidis ilin tie komenci pafmortigadon de aliaj bestoj, iliaj infanoj, gepatroj kaj aliaj familianoj. Mi ne vidis ilin eksplodigi lernejojn, malsanulejojn, kaj multajn aliajn konstruaĵojn pro malamo al tiuj kiuj loĝas en tiu lando. Sed mi vidis homojn fari tion. Kaj la plej multaj el ni ja scias ke multaj homoj tute ne hontas pro tio, sed male estas tute fieraj kaj konsideras sin herooj venkintaj la malbonon, kvankam evidente ankaŭ ili krimis kontraŭ la homaro! Do, ĉu surprizas vin ke mi tre ofte konsideras bestojn multe pli bonaj ol homoj?

Tion kion mi tie, iom pli supre priskribis, faras homoj. Se ili sukcesas reveni vivaj, kvankam la plej multaj el ili revenas invalidoj por la cetero de sia vivo, ili estos konsiderataj herooj, kvankam ili ja certe ne estas tiaj. Krimuloj ne estas herooj. Sed tiuj homoj, kiuj sukcesos reveni preskaŭ vivaj, kvankam tro ofte sen brakoj kaj kruroj, kaj ankaŭ kun difektita menso, faris ja nur tion kion oficiroj ordonis al ili. Ili faris laŭ la volo de oficiroj. Do, ĉu la oficiroj estas la krimuloj? Ne ĉiuj el ili, ĉar ili agis ja nur laŭ la volo de iuj aliaj. La vera krimulo estas tiu kiun oni nomas la militministro de la lando, eble oni nuntempe nomas lin la "defendministro". Tio ne faras iun ajn diferencon, sed tiu ja ricevas siajn ordonojn de la ĉefministro aŭ en iuj landoj reĝo aŭ reĝino, ĉu ne? Estas do ne malfacile kompreni kiu estas almenaŭ la ĉefkrimulo. Sed tiu ĉefkrimulo ja neniam bruege kun trumpetoj kaj pezaj botoj kontraŭleĝe kaj sen bileto, pasporto kaj vizio, eniras ies landon. Li

ne kuraĝas tion fari, li povus ja perdi sian vivon tion farante, ĉu ne? Li do restas hejme ĉirkaŭata de gardistoj kiuj gardas lin kaj lian vivon. Kiu gardas la vivon de la soldatoj? La respondo estas facila, ĉu ne? Neniu! Soldatoj devas riski siajn vivojn por ke riĉeguloj povu plu vivi!

Nu, ni homoj, tiuj el ni kiuj ankoraŭ povas pensi, bonege scias ke tio ne plu rajtas daŭri. Kaj ne nur ni povas tion kompreni. Iu superinteligenta homo, naskiĝinta la 15-an de decembro 1859, specialisto pri okulmalsanoj, jam la 26-an de julio 1887, kiam li estis 27-jara, publikigis sian “Unuan Libron” klarigante al la tutmonda popolo kiel akiri ne nur tutmondan interkomprenon sed ankaŭ eternan tutmondan pacon!

Ankoraŭ hodiaŭ la plej multaj homoj priridas lin opiniante ke tutmonda paco tute ne eblas. Kaj ofte ŝajnas ke ili pravas. Ŝajnas ke precipe tiuj kiuj regas tute ne volas ke iam estu eterna paco sur tiu ĉi planedo. Sed tiu famekonata okulkuracisto evidente volis nur la plej bonan por la homaro, kiu ja bezonas pli bonan vivon, ol konstantan vivon en milito.

En tiu sia “Unua Libro” la bonega doktoro, lia nomo estas Zamenhof se vi ne jam divenis tion, tute senpage disdonis novan, pli facilan kaj pli belan lingvon al la homaro. Kiuj lernas ĝin ĉiuj tre baldaŭ poste trovos ke ili senprobleme povas komuniki kun aliaj homoj kiuj jam lernis ĝin. Do, lerninte tiun eksterordinaran belegan kaj interesan lingvon, la homoj iĝos geamikoj, kvankam tio ne ĉiam kongruas kun la deziroj de tiuj kiuj regas! Sed kiuj regas tiuj nur tre malofte pensas pri tio kio estas la plej bona por ordinara homoj. Ŝajnas ke ili tro ofte pensas nur pri tio kio estas la plej bona por ili mem! Necesas do

ke ordinara homoj komencu pensi pri tio kio okazas!

Pro iu kaŭzo tiuj kiuj regas, ŝatas, eĉ ŝategas ke ordinara homoj falu kiel kadavroj sur diversaj batalkampoj dise en la mondo. Necesas do ke ni, ordinara homoj, tiuj kiuj laboras en malpuraj kaj malsanigaj fifabrikaĵoj kontraŭ tro malmulte da mono kaj pagas tro altajn impostojn, ĉiuj rifuzu partopreni la sangelverŝigon kiu plaĉas al tiuj kiuj regas. Do, mia konsilo al ordinara homoj estas: “rifuzu partopreni en militoj!”. Kiam ĉiu ordinara homo en la tuta mondo ekkomprenos tion, ni havos tutmondan kaj eternan pacon! En la komenco tiuj kiuj regas simple reagos per pafmortigo de la rifuzantoj, sed ili ja ne povas mortigi la tutan laboristaron de siaj landoj. Tiel farante ili ja riskus ke ili mem iun belan tagon devus komenci labori kaj sendube ili sentas sin tro gravaj por fari ion ajn utilan! Kaj se oni obeos al tiuj kiuj regas, oni ja ankaŭ perdos sian vivon, ĉu ne? Sed almenaŭ morti kiel rifuzanto estas multe pli heroe ol morti kiel obeanto detruanta la hejmojn, fabrikojn, kaj malsanulejojn de homoj en diversaj landoj. Obeante al Zamenhof tiuj multaj diversaj landoj, jam antaŭ la jaro 2084, iĝos unu granda, eĉ grandega lando, eĉ landego kun unu komuna lingvo. Tiu lingvo malebligos al tiuj kiuj regas miskomprenon, kaj, kiel jam iom ofte dirite “paco eterna regos en la tuta mondo!”. Tamen, ĉu la nuna homaro kapablos kompreni tion ĵus diritan? Se ne, eble mi devus esti nominta ĉi tiun artikolon 3084!

Ekskurso al Borobudur

KAM LEE (HOBARTO)



Ĉe la bazo de la templo. La ĉirkaŭaĵo aspektas tre izolita, sed fakte proksime ĉe la aliaj flankoj de la fotilo estas proksimume 150 turistoj!

Iun posttagemzon, mi veturis kun grupo de esperantistoj al Borobudur, budhista templo je 30 km nordokcidente de Jogjakarto en Indonezio. La ekskurso komenciĝis ĉe enirejo de templa parko. Ni piediris laŭ unu-kilometra ŝtona piedvojo ĉirkaŭata de ordita gazono kaj belaj ĝardenoj. Ĉe la fino de la piedvojo estis la templo, Borobudur, kiu aspektas kiel granda ŝtona piramido.

La templo estas unu el la plej mirindaj budhistaj monumentoj en la mondo kaj ĝi estas la plej

vizitata turista loko en Indonezio. Certe ĝia bela aspekto subtenas ĉi tiujn pretendojn. La templo estas konstruita el andezito, magma vulkana ŝtono. La konstruaĵo havas kvadratan bazon de 123 x 123 metroj, kaj ĝia plej alta punkto estas je 35 metroj super la ternivelo.

Tre interesa estas la historio de la sanktejo. La religia konstruaĵo estis konstruita dum la 9a jarcento, sed dum multaj jarcentoj ĝi estis kaŝita sub vulkana cindro kaj ĝangalo. Atesto subtenas ke dum la 14-a jarcento la templo estis forlasita pro



Sur bazo de stupao. Kelkaj el la stupaoj enhavas statuon de Budho.



Ĉirkaŭaĵo ĉe la oka etaĝo de la templo. Oni povas vidi belajn montarojn.

malgrandiĝo de la hinduaj regnoj en Javo kaj ŝanĝiĝo al la islama religio.

Signifa dato de la templa remalkovro estis 1814 kiam Cornelius, nederlanda inĝeniero, kun 200 viroj vizitis la lokon kaj trovis la monumenton kovritan en ĝangalo. Post tranĉado de multaj arboj kaj brulado de troa vegetaĵo, la origina templa medio estis reatingita.

Raffles (guberniestro de Javo dum ĉi tiu epoko) estis oficiale honorita pro la remalkovro kaj sciigo al la mondo pri la templo. La templo konsistas el ses kvadrataj terasoj kaj tri pli altaj cirklaĵoj terasoj. La kvadrata teraso havas la formon de la kvadrata bazo de la templo.

Mi komencis esplori la templon unue per piediro en la malaltaj etaĝoj kiuj fakte pli aspektis kiel koridoroj, ĉar du flankoj de la terasoj havas murojn. Sur la muroj estas multaj reliefoj de homoj, kaj ili portretas rakontojn. Tiuj niveloj aspektas kiel stranga artgalerio kaj ili rilatas al la deziroj de la homo influataj de malbonaj pensoj. La mezaltaj etaĝoj rilatas al la kontrolo de malbonaj pensoj kaj uzo de oniaj bonaj pensoj.

Mi supreniris al la pli altaj etaĝoj, grandaj rondaj terasoj kun multaj stupaoj. Rigardante en ĉiuj direktoj, oni povas admiri la belan ĉirkaŭaĵon de arbaro, montetoj, kaj nuboj. Granda centra kupolo montras la



Unu el la supraj niveloj de la templo. La templa muro montras la komencon de la mezaj niveloj.



Ĉe la ĉefstupao, kiu estas la loko de la centro kaj supro de la Borobudur-a templo. Ilia Dewi kaj Tristan McLeay sidas.



Parto de la malaltaj partoj de la Borobudur-a templo.

plej altan parton de la templo. La altaj niveloj rilatas al homaro ne ligita de fizikaj kaj mondaj deziroj.

Interesa flankrakonto temas pri aĉeto de ŝtona stupao. Enirante en la Borobudur-parkon je la komenco de la vizito, kelkaj vendistoj ĝoje proksimiĝis al mi. Mi estis antaŭavertita pri la risko de trompemaj vendistoj sed mi ankaŭ deziris esplori la eblecon aĉeti valorajn memoraĵojn. Ili demandis ĉu mi deziras aĉeti ion. Mi respondis ke mi ne deziras ion specifan, sed poste viro montris al mi malgrandan ŝtonan stupaon kiu estas dek centimetrojn alta. Poste, li levis la supran parton de la stupao kaj sur la malsupra parto sidis malgranda statuo de Budho. Interesita pri la afero, mi

respondis ke mi devas havi tempon por pripensi la aferon kaj eble mi konsideros la proponitan prezon post mia vizito al la templo. Post mia vizito al la templo, mi estis iomete surprizita ke la vendisto trovis min tre rapide kaj ni diskutis pri la prezo. Koincide, policisto preterpasis kaj mi demandis al li kio estas bona prezo por ĉi tiu skulptaĵo. Li diris ke li ne estas tutcerta pri la kosto kaj plue diris ke la kliento devas fari la finan decidon. Do la afero daŭras, ĉu ne? Finfine, mi decidis akcepti la riskon kaj mi aĉetis la skulptaĵon. Mi piediris al alia parto de la parko kie troviĝas memoraĵbutikoj. Similaj stupaoj estis vendataj je kvarono de la prezo! Poste, mi trovis ke tiuj stupaoj estas tute solidaj kaj ne enhavas statuojn.

Finfine, ni reiris per aŭtobuso al nia hotelo. Certe tiu estis memorinda vizito kaj eble oni bezonas multajn

tagojn por tute rigardi kaj aprezi la skulptaĵojn kaj arkitekturon de Borobudur!

Stupao aĉetita de vendisto ĉe Borobudur. La ŝtona aĵo konsistas el du pecoj de andezita ŝtono. La alta parto (maldekstre) estas kava konuso kaj ĝia flanko kuŝas sur la tero. La malalta parto estas la bazo kaj ankaŭ havas statuon. Dekcenda monero dekstre montras la relativan grandecon de la stupao.



Lingvaj humuraĵoj

PAUL DESAILLY (ADELAJDO)

“Tion mi kredos kiam mi ĝin vidas” iĝas “Vidos ĝin vi, kiam vi kredas.” Eldiroj de populara sed ne oficiala bazo atribuitaj al Kavaliro Abdul Baha KBE inkludas la jenan spritaĵon al ateisto:

“Je la dio, je kiu vi ne fidas, ankaŭ ni ne kredas.”

“Ni estas ĉiuj dioj,” origine “Ni estas ĉiuj de Dio” (kaj, post sincermiena paŭzeto) “kaj al Dio ni reiros.”

Kiel skribite en la 26-a ĉapitro de Mateo de la Sankta Biblio, tio okazis ĉe la Festo de Pasko mallonge post

la Lasta Vespermanĝo, ke Li ardege preĝis kun la disĉiploj en la Ĝardeno de Getsemane.

40 Kaj Li venis al la disĉiploj kaj trovis ilin dormantaj, kaj diris al Petro: Kio? Vi ne povis gardi kun mi unu horon?

41 Vigliĝu kaj preĝu, por ke vi ne eniru en tenton; **la spirito ja estas fervora, sed la karno estas malforta.**

Pro manko de esperantigo de la *Nova Testamento de la Biblio* ĝis eksplodis la unua mond-milito, oni en Japanio laŭ Oomotaj amikoj miaj ofte miskomprenis tiun faman aforismon

de Jesuo Kristo jene: **“la vino bongustas, sed la viando ekputras.”**

“Dum mi parolas, venas en mian menson epizodo kiu okazis en Bagdado. Estis tie du amikoj kiuj ne sciis la lingvon, unu de la alia. Unu malsaniĝis; la alia vizitis lin, sed ne povis parole esprimi sian simpatian kaj do faris geston por demandi: “Kiel vi fartas?” Per alia signo la malsanulo respondis: “Mi estas tuj mortonta”; kaj la vizitanto, kredante ke li diris ke li ekresaniĝas, diris: “Dank’ al Dio!” El tiaj ilustraĵoj vi konstatos ke la plej bona afero en la mondo estas povi vin komprenigi al viaj amikoj kaj ankaŭ ilin kompreni; kaj ke ne estas io pli malbona en la mondo ol ne povi komuniki viajn pensojn al aliaj. Sed, se estus helpa lingvo, ĉiuj tiuj malfacilaĵoj estus forigitaj.”

Abdul Baha, Skotlando, sub



La Framasona Salonego en Edinburgo kie Abdul Baha humure parolis en 1913 sub aŭspicio de la Esperanto-societo.

aŭspicio de la Edinburga Esperanto-societo, januaro 1913

Dum jardekoj inter la du mondmilitoj elstaraj bahaaj pioniroj flue parolis la zamenhofan lingvon. ĉu de Oriento aŭ Okcidento, ĉu viro aŭ virino, tiu mondcivitano de Pensilvanio, Martha Root, estis definitive la plej renoma adepto de Bahaismo. Ĝiaj komentoj kaj prognozo amuze montras sian fidon je Esperanto:

“La 18a Universala Kongreso de Esperanto okazis en Edinburgo, Skotlando, de la 31-a de julio ĝis la 7-a de aŭgusto 1926. Eble oni plej bone komencas priskribi tiun kongreson per la vortoj de George Stephenson, kiu loĝis en Britio sufiĉe proksime al Edinburgo. Dum li cerbumis pri sia lokomotivo lia kara sed dubema patrino eĥe diradis ‘Ho George, ĝi neniam funkcios!’. Kiam la maŝino estis pretita kaj glate veturis, nia inventisto akompanis sian patrinon dum vojaĝo kaj tiam ŝi subite ekkriis ‘Ho George, ĝi neniam haltos!’. Martha daŭrigis: “ En unu frazo, jen la sama situacio de Esperanto”. Tiamaj ‘spertuloj’ rezonis je la propra kontentigo ke, eĉ se oni konstruus vaporlokomotivon, ĝi neniam ekiros pro manko de sufiĉa froto inter ŝtalaj radoj kaj glataj ŝtalaj reloj. Cetere, la rapideco de la plej fortaj ĉevaloj sufiĉos por ni ĉiuj.”

La usona spackompanio NASA (Nacia Aeronautika Spaca Administracio) en la jaro 1977 sendis du kosmoveturilojn *Vojaĝanto 1* kaj

Vojaĝanto 2 trans nian sunsistemon kaj eĉ en pli forajn distancojn de la galaksio. La du kosmoveturiloj portas orumitajn diskojn kun terglobaj sonoj de la naturo. Sur tiu disko troviĝas poemo de Baudelaire en la franca lingvo, krome mesaĝoj en la lingvoj angla, flandra, indonezia, persa, sveda, urdua kaj en la niĝeria lingvo Efik, kaj ankaŭ mesaĝo en Esperanto.

La 2an de junio 1977 Ralph Harry, tiam ambasadoro de Aŭstralio ĉe Unuiĝintaj Nacioj en Nov-Jorko, estis invitita registri mesaĝon al eventualaj inteligentaj estaĵoj ie en la kosmo kie surplanediĝus *Vojaĝanto 1* aŭ *Vojaĝanto 2*. Ralph Harry registris angle kaj Esperante la jenan tekston: “Amikoj, mi parolas al vi el la planedo Tero. Mi reprezentas la landon Aŭstralio, insula kontinento en la suda hemisfero de nia planedo. Ni strebas vivi en paco kun la popoloj de la tuta mondo, de la tuta kosmo, kaj labori kun ili por komuna bono de ĉiu viva estaĵo. Mi salutas ĉiun kiu komprenas. Adiaŭ!”. Ĵurnalisto el Nov-Jorko demandis al s-ro Harry ĉu li vere kredas ke inteligenta persono en la Lakta Vojo komprenos Esperanton. Harry respondis ke li certas ke eksterteraj inteligentuloj deĉifros la Esperantan tekston pli rapide ol la poemon de Baudelaire.

En fama intervjuo en kiu oni demandis kiajn armilojn oni uzos en tria mondmilito, Albert Einstein naive diris ke li ne scias. Tamen, la fama profesoro tuj certigis la ĵurnaliston ke la armiloj de la kvara mondmilito estos bastonoj kaj ŝtonoj. “Kiel,”

demandis Albert, “Dio punos min por kreado de la scienco kies sekvo estas atomaj bomboj? Mia kapo estas plena je teorioj pri la mondo de la mortintoj, sed mi ne povas strukturigi ilin kohere pro manko de krajono kaj papero en la flamoj de la infero.” Parenteze, inter la punoj de Hitlero estas traduki samloke en la hebrean kaj la jidan lingvojn *Das Kapital*.

“Estu serĉantoj de la lumo, ne gravas el kiu lanterno brilas. Ne amu la lanternon. Unufoje la lumo brilis el lanterno en Oriento, nun en la Okcidento. Se ĝi venas de nordo, sudo, de kia direkto ĝi progresas, sekvu la lumon. Lasu min ilustru plu. Iu donacis moneron al kvin almozuloj. Ili decidis elspezi por akiri manĝaĵon. La anglo diris: “*Aĉetu grapes*.” La turko deziris *uzum*, la arabo *anab*, la greko *stafi’li*, la perso *angur*. Ne komprenante la lingvon unu de la alia, ili kverelis kaj batalis inter si. **Fremdulo** venis. **Li** konis ĉiujn kvin lingvojn. Diris **Li**: “Donu al mi la moneron, mi aĉetostion kion vi deziras.” Kiam **Li** alportis al ili vinberojn, ili ĉiuj satiĝis. Ili volis la samon, sed nur diferencis en la termino. Mallonge, kiam la realo mateniĝas meze de la religioj, ĉiuj estos unuiĝitaj kaj pacigitaj.” (Abdul Baha, *The Promulgation of Universal Peace*)

Definitive, gekaraj, la plej amuza afero al mi kuŝas en tio ke inter bahaanoj oni konsideras min esperantisto kaj inter esperantistoj oni konsideras min kiel bahaano.

Ekskurso al la natura parko de Monto Merapi

KAM LEE (HOBARTO)

Frumatene, mi kun grupo de esperantistoj veturis aŭtobuse norden el Jogjakarto al la natura parko de Monto Merapi por viziti la vulkanon kaj aliajn vizitindajn lokojn. La distance el la urbocentro de Jogjakarto al Monto Merapi estas 30 kilometroj. Alveninte al la turista centro de la natura parko, ni ekskursis per du ĵipoj laŭ cirkla kaj serpenta senasfalta vojo tre malglatega kaj ofte tre kruta. La ĉirkaŭaĵo ĉefe estis mikso de

mezdensa kaj densa ĝangalo.

Nia unua signifa vizitloko estis malgranda ponto sur la rivero Opak kiu fluas al Jogjakarto. La ponto estas ankaŭ rigardejo por vidi norde Monton Merapi, sed bedaŭrinde la kratero estis nubkovrita.

Monto Merapi, kies indonezia nomo signifas “monto de fajro”, estas la dua plej aktiva vulkano en Indonezio. Dum 1996 okazis granda erupcio kaj 66 homoj mortis. Malgrandaj erupcioj okazas ĉiujn 2-3 jarojn kaj grandaj erupcioj okazas ĉiujn 10-15 jarojn. La plej grandaj erupcioj okazis en 1006, 1786, 1822 and 1930. Pli ol 1300 homoj mortis dum la erupcio en 1930. En 1006, la erupcio estis tiom granda ke ĉio en centra Javo estis kovrita per cindro.

Daŭrante la ekskurson, ni iris al la venonta ircelo, la vilaĝo Pentung. Ni vizitis la Muzeon Sisa Hartaku (Mia Cetera Trezoro-Muzeo) kiu antaŭe estis domo parte detruita de erupcio en 2010. Nuboj de varmega cindro elvenis el la vulkano, kaj tiaj nuboj povas atingi temperaturojn de 500 gradoj. Dum ĉi tiu erupcio, homoj kiuj loĝis ĉe 20 kilometroj de la vulkano devis foriri. Ni vidis en la muzeo brulitajn lignajn aĵojn, indikaĵojn de granda brulado, kaj grandajn rokojn sur la planko.

La sekva vizitloko estis granda



Nia aventuro al regiono sude de Mt Merapi komenciĝas! La ekskursgrupo veturis per du ĵipoj.



Ĉe la Muzeo Sisa Hartaku (Mia Cetera Trezoro-Muzeo) en la vilaĝo Pentung. Granda parto de la vilaĝo estis detruita pro vulkana erupcio en 2010.



La rokego estas nomita “Fremdula Roko” kaj oni povas vidi ke ĝi ŝajne havas vizaĝon. La alteco de la rokego estas almenaŭ du metroj super la nivelo. La pezega rokego estis forĵetita el la kratero de Monto Merapi kiu estas multajn kilometrojn for!

ebena loko kie plantoj ne kreskis. Ni rigardis rokegon nomitan “Fremdula Roko” kiu estas 3 metrojn alta kaj havas la formon de kapo kun vizaĝo. La ŝtonego estis forĵetita el la vulkano al proksimume 13 kilometrojn for. Rigardebla estis Monto Merapi ankoraŭ nubkovrita. Tamen, de tempo al tempo, la nuboj foriris dum mallongaj periodoj kaj do videbla estis la distinga noĉita vulkana kratero. Fumo el la kratero



En la bunkro kiu povas protekti eble pli ol 40 homojn kontraŭ vulkana erupcio, sed bedaŭrinde ne estas garantio de supervivo. Dum antaŭa erupcio, du homoj eniris la bunkron sed ili ne supervivis.



Ekster la eniro de la bunkro en Kaliadem. La distanco inter la kratero kaj la bunkro estas malpli ol dek kilometroj.

estas videbla dum 300 tagoj jare, sed hodiaŭ mi ne povas forte konkludi ke mi vidis fumon el la vulkano. Monto Merapi estas 2930 metrojn alta kaj 38 metrojn pli malalta nun ol dum la erupcio en 2010.

La lasta ekskursiva ircelo estis la malgranda vilaĝo Kaliadem kiu konsistas el grupo de vilaĝaspektaj butikoj kiuj vendas nutraĵojn, trinkaĵojn, kaj memoraĵojn. Proksima al la komerca loko estas betona subtera bunkro uzata por protekti homojn kontraŭ lafo. Monto Merapi estas nur 5 kilometrojn for.



Sur rando de laforavino.



Rigardante kontraŭrivere laforavinon. La rilatumo inter la alteco de la klifo kaj la grandeco de la homo videbla sur la maldekstra rando de la ravino estas tre granda. Estas kalkulite ke la alteco de la klifo estas eble pli ol kvardek metroj.

Ni eniris la sufiĉe grandan bunkron kies dimensioj estis 15 x 10 x 3 metroj. Tamen, dum erupcio en 2006, du homoj eniris la bunkron kiu estis sufiĉe fortika sed poste kovrita ĝis 2 metroj de vulkana rubo kaj varmega cindro kiu atingis temperaturojn de 300 gradoj. Bedaŭrinde neniu supervivis.

Ni piediris 200 metrojn laŭ piedvojo ekster la vilaĝo kaj ni trovis grandan laforavinon kies klifoj estis pli ol 30 metrojn altaj kaj ĝia largeco



Sur rando de laforavino.



Ekskursgrupo ĉe Kalladem. Estis tre ĝoja aventuro.

estis 40 metroj. La nigra laforavino estis tre spektakla. Ni ne povis piediri al la planko de la ravino ĉar la klifoj estis tro krutaj. Oni informis min ke temas pri parto de la planko kie la roko estas ankoraŭ varmega.

Ni revenis al la vilaĝo kaj poste al la komencloko de la ekskurso. Mi havas multajn bonajn memorojn pri ĉi tiu unika aventuro.

La diferenco inter la bahaa kredo kaj aliaj mondaj religioj

PAUL DESAILLY (ADELAJDO)

Ses milionoj da bahaanoj el ĉiuj landoj kaj regionoj kredas je la nocio de progresiva revelacio. La fondintoj listigitaj ĉi tie de Budhismo, Hinduismo, Judismo, Zoroastrismo, Kristanismo kaj Islamo, t.e. Manifestiĝoj de Dio, jam surtere estas revenintaj spirite en la nomo de “Bahaa” kiel promesite en la Sanktaj Libroj. Abrahamo, Moseo, Kriŝno, Zoroastro, Budho, Jesuo, kaj Mahometo posedas la saman spiriton, t.e. la sola vera signifo de reenkarniĝo. Ili estas senditaj unu post la alia de la Kreinto por gvidi nin. Ili diferencas inter si nur per la fizika ekstera formo kaj per la gloro de la Diaj atributoj donacitaj al Ili de la Kreinto laŭ krizokazoj de la epoko en kiu Ili sinsekve estas aperintaj. Tute same Bahá’u’lláh estas la Manifestiĝo de Dio por nia tempo. (Nova Disendito, Manifestiĝo de Dio, ne aperos ĝis la paso de pli ol ok cent jaroj.) Do, en tiu gravega senco neniuj diferenco ekzistas inter Bahaismo kaj aliaj Kredoj, nek pri iliaj plej grava leĝo: amu vian proksimulon kiel vin mem!

Diferencoj inter religioj troviĝas tamen en iliaj multaj relative malgravaj soci-instruoj ĉirkaŭ geedzeco, eksedziĝo, heredo ktp sed ili ĉiuj same instruas la gravegan spiritan veron: ami la proksimulon. En tempoj pasintaj, ekzemple en iuj

nomadaj socioj, logika kazo ekzistis por poligamio, okulon pro okulo kaj eĉ por servuteco. Kun la tempopaso certaj leĝoj de relative malplia graveco estas nuligitaj kaj eĉ la Ora Regulo estas ĝisdatigata kiel ĉiu Manifestiĝo de Dio konstruas sian mision sur la ŝultroj de la antaŭa Disendito, analoge kun edukistoj hodiaŭ kiuj gvidas studentojn tra infanĝardeno, gimnazio, kaj fine al la universitato.

La tri Eminentuloj de la Bahaa Kredo estas: (I) Bahá’u’lláh, 1817-1892, la Fondinto. Lia sankta nomo en Esperanto signifas la “Gloro de Dio”; (II) ‘Abdu’l-Bahá, 1844-1921, kies nomo en Esperanto estas la “Servanto de la Gloro”; kaj (III) Shoghi Effendi, la sola Gardanto de la Bahaa Kredo kaj pranepo de Bahá’u’lláh. Shoghi Effendi mortis en Londono en 1957 kiam li estis sesdek-jaraĝa; ses jarojn poste inaŭguriĝis la Universala Domo de Justeco.

Kio precize kaj koncize estas la Bahaa Kredo? Laŭ lakona klarigo de Shoghi Effendi: “La Bahaa Kredo estas sendependa mond-religio kies celo estas spirite revivigi la homaron, rompi la barilojn inter la popoloj kaj starigi la fundamenton de mond-unueca socio laŭ principoj de amo kaj justeco.” Jene klarigas ‘Abdu’l-Bahá: **“Al bahaanoj religio estas tio kio estas atingita per esplorado kaj ne**

tio kio baziĝas je imitado.” Bahaaj gepatroj al siaj infanoj instruas pri ateismo kaj pri ĉiuj religioj.

Ĉiu bahaano kredas ke “la Promesito de ĉiuj popoloj de la mondo aperis. Ĉiuj popoloj kaj komunumoj atendis Revelacion kaj Li, Bahá’u’lláh, estas la plej eminenta instruanto kaj edukanto de la homaro.” La bahaaj instruoj por atingi la mondan pacon devenis de la plumo kaj el la buŝo de Bahá’u’lláh antaŭ jarcento kaj duono. Liaj instruoj kaj principoj jam mirakle rapide ĉirkaŭiris la tutan mondon antaŭ jardekoj kaj estas adoptataj de diversaj grupoj multnombraj. Tiuj instruoj ankoraŭ kaj senprecedence ekzistas en originalaj manuskriptoj de Profeto de Dio, Disendito, por ke ni kaj estontaj generacioj intense kaj vigle esploru ilin tiel ke, por ĉiam estu minimumigita la ekstrema danĝero de ne-aŭtoritataj ŝanĝoj, interpretoj kaj intervena malhelpo flanke de pastrara aŭ intelektulara elito mem elektita.

Rilate tiun esploradon Bahá’u’lláh emfaze ordonis ke oni devas fari enketojn pri la vero por si mem tute sen superstiĉoj, sen ritoj, sen dogmoj, sen tradicioj superflujaj. Memstara esplorado de la vero estas **la unua principo** de la Bahaa Kredo por ke finfine realiĝu surtere vera justeco.

La dua principo rilatas al la **unueco de Dio**, tiu unu sola Kreinto kiu ĉiam estis kaj ĉiam restos nekonebla esenco kaj al la **unueco de la homaro** - la Patreco de Dio kaj la gefrateco de la homaro. “La tero estas nur unu lando kaj ĉiuj homoj ĝiaj civitanoj.” “La donaco de Dio al tiu ĉi klera tempo estas la scio de la homara unueco kaj

de la fundamenta **unueco de religioj.”**

La tria: “Kion la Eternulo ordonis kiel suverenan kuracilon kaj plej fortan rimedon por resanigi la tutan mondon, estas la unuiĝo de ĉiuj popoloj en unu universala religio, unu komuna Kredo.” Bahá’u’lláh. “Vera religio estas la plej potenca fortikaĵo por eviti ĥaoson. Ĝi celu al unueco. Religio similas al medikamento, sed se ĝi pliigas la malsanon estus preferinde rezigni pri ĝi.” Bahá’u’lláh.

La kvara: la forigo de ĉiuj antaŭjuĝoj:

“Tiel longe kiel rasa, nacia, politika kaj religia antaŭjuĝoj restos, la timego pri milito daŭros. La sola kuracilo estas universala paco. La bonfarto de la homaro, ĝia paco kaj sekureco estos neatingeblaj antaŭ ol kaj ĝis kiam ĝia unueco estos firme starigita.”

La ceteraj principoj por akceli ĝeneralan malarmadon kaj por transformi la socion:

Kvina: egaleco de rajtoj inter viroj kaj virinoj.

Sesa: la forigo de la ekstremoj de riĉeco kaj malriĉeco.

Sepa: krom **aboli** la ekstremojn de riĉeco kaj malriĉeco, gravas atenti ankaŭ pri profito-dividado kaj malinvestado kaj super ĉio: la konscio ke la monda ekonomia problemo estos renversita nur per spirita solvo, t.e. libervola divido de la propraj posedaĵoj.

Oka: la rekono ke vera religio tute harmonias kun la racio kaj la scienco.

Naŭa: universalaj sistemoj de edukado, mezuriloj, pesiloj, mono, arbitracio kaj regado.

Deka: lastvice sed ne lastrange kaj ne necese realigota laŭ kronologia ordo de la supra listo: utiligado de universala helpa lingvo tra la tuta mondo.

‘Abdu’l-Bahá diris ke ni devas marŝi la ĉielan vojon per utilaj kaj praktikaj piedoj. El tio sekvas ke multaj bahaanoj scipovu ekzemple la anglan, la ĉinan, la rusan k.s. simple por vivteni sin. Bahaaj pioniroj, vojaĝantaj instruantoj de la Kredo, gestudentoj kaj eĉ komercistoj en eksterlando lernu unue - post la patrina lingvo kompreneble – almenaŭ unu lingvon de la gastiga lando. Ĝis tiam kiam faras definitivon anoncon la parlamentoj de la nacioj pri la monda helpilo instruota en ĉiuj lernejoj de la mondo ĉiu bahaano kiel unuopulo laŭ la propra konscienco rajtas decidi por si mem pri la rolo de la Internacia Lingvo.

Tamen, kaj gravege tamen, la bahaaj sanktaj skriboj inkludas multajn specifajn referencojn al Esperanto kaj al D-ro Zamenhof. Kelkfoje ‘Abdu’l-Bahá ne nur skribis al unuopaj Esperantistoj sed li alparolis ilin en kluboj kaj aliaj lokoj. Dum prelego kiun ‘Abdu’l-Bahá faris en Parizo en 1913 li menciis Esperanton kvar fojojn kaj unu fojon oblikve aludis ĝin ene de nur du belegaj paraĝrafoj.

Antaŭ ol ŝi mortis en Treblinka, nazia koncentrejo en Pollando, Lidia Zamenhof, la plej juna infano de Klara kaj Ludoviko Zamenhof, tradukis *Bahá’u’lláh kaj la Nova Epoko* (BNE) en la Mondan Lingvon (Shì Jiè Yu, t.e. la nomo de Esperanto en la Ĉina Popola Respubliko kies registaro ESK | paĝo 20 | 130 | marto 2018

jam de multaj jaroj forte subtenas nian internacian lingvon) ĉar ŝi estis sincera, kortuŝita, pola, bahaa Esperantisto. Geamikoj! Bonvolu rimarki la sanktajn vortojn de ‘Abdu’l-Bahá’ pri la simfizo, la simbiozo, la koincidoj inter la Bahaa Kredo, la Interna Ideo de Esperantismo kaj de la monda paco: “La plej granda rimedo akcelante unuiĝon de la Oriento kaj la Okcidento estos komuna lingvo. Ĝi faros el la tuta mondo unu hejmon, kaj ĝi fariĝos la plej forta impulso por la homa antaŭeniĝo. Ĝi levos la standardon de la unueco de la homaro. Ĝi faros el la tero unu universalan komunajon. Ĝi estos kaŭzo de amo inter la homidoj. Ĝi kaŭzos bonan kunvivadon de diversaj rasoj.”

“Dankon al Dio, ke D-ro Zamenhof elpensis la lingvon Esperanto. Ĝi posedas ĉiujn eblajn kvalitojn por fariĝi rimedo de internacia interkomunikiĝo. Ĉiuj el ni devas esti kontentaj kaj dankemaj al li pro lia nobla penado, ĉar tiumaniere li faris bonan servon al siaj proksimuloj. Per senlaca penado kaj sinoferemo flanke de ĝiaj pioniroj Esperanto fariĝos universala. Tial ĉiu el ni devas studi tiun ĉi lingvon kaj disvastigi ĝin laŭ sia eblo por ke ĝi estu tagon post tago pli vaste konata, por ke ĝi estu akceptita de ĉiuj nacioj kaj registaroj de la mondo, kaj fariĝu parto de la programo en ĉiuj publikaj lernejoj. Mi esperas ke Esperanto estos akceptita kiel lingvo de ĉiuj estontaj internaciaj konferencoj kaj kongresoj, por ke ĉiuj homoj bezonos lerni nur du lingvojn; unue sian patrolingvon

kaj due la lingvon internacian. Tiam perfekta harmonio estos starigita inter ĉiuj popoloj de la mondo. Konsideru kiel malfacile estas hodiaŭ interkomunikiĝi kun diversaj nacioj. Se oni studas eĉ kvindek lingvojn oni ankoraŭ tamen povas vojaĝi tra lando kaj ne koni ĝian lingvon. Tial mi esperas ke ĉiu el vi streĉos ĉiujn siajn fortojn, por ke la lingvo Esperanto larĝe disvastiĝu.” (‘Abdu’l-Bahá, Parizo, februaro 1913. (Tradukis: Lidia Zamenhof)



Lidia Zamenhof
1904 - 1942

Fine ĉokolado!

KATJA STEELE (ADELAJDO)

Nia karmemora Pat Palmer tre kompetente verkis rakontetojn angle. Ŝi eldonis libreton kun la titolo Cream Horns and Handstands pri ŝia tempo dum la Dua Mondmilito. Ŝi estis tiam dekkelkjara lernejanino. Pro la fakto ke ŝia lernejo, Minton Mount College, estis apud Londono, oni evakuis la lernantinojn al norda Devon, graflando iom pli sekura kontraŭ germanaj bomboj. Pat bone memoras la momenton kiam ŝi eksciis ke la milito finiĝis.

Kiel bone mi memoras aŭdi pri la fino de la milito en majo 1945. Mi dormis en dulita ĉambro kune kun Podge Bentley. Kiel mi menciis antaŭe, nia klaso ricevis loĝejon en aldona domo apud la hotelo. Unu parto estis okupita de familio, kaj tra la maldika vando ni povis aŭdi ilin paroli, moviĝi, aŭ aŭskulti radion. Iun nokton ni aŭdis dramoplenan anoncon: la milito en Eŭropo finiĝis. Churchill anoncos la venkon morgaŭ.

Ni ĵete eksidis en niaj litoj, tute ekscititaj. Ni decidis ke ni devas



informi la aliajn: ni skribu sur slipon kaj metu ĝin sub la ĉefan pordon de la dormejo. Ni trovis krajonon, sed nek mi nek mia kunĉambranino havis paperon. Senespere ni forŝiris pecon de la “deskvamiĝanta” tapeto kaj skribis



nian ekscitan mesaĝon. Estis severaj reguloj pri parolado aŭ foriro el la lito post estingo de la lampoj, kaj mi estis nervoza kiam mi ŝteliris laŭ la koridoro, kaj frapetante sur la pordon mi traŝovis la slipon. Nuntempe mi emas ridi kiam mi memoras nian timon esti kaptitaj dumfare. Ĉu ne estintus pardoninde se ni eĉ kriegintus tian mirindan novaĵon kaj ĉiuj surloke festus?

Fakte ni regis nin ĝis la matenmanĝo, kie mallonge poste la lernejestrino faris la anoncon. Oni cedis al ni tutan tagon liberan je lecionoj, kaj al ĉiuj estis donita tabuleto da ĉokolado. Kia ĝojo!

Poste la vivo daŭris preskaŭ laŭkutime. La manĝaĵoj ne subite pliboniĝis. Tamen estis ĝenerala sento de anticipado kiam ni eksciis ke baldaŭ ni reiros al nia vera hejmo apud Crawley en Sussex. La pliaĝaj knabinoj memoris ĝin kaj parolis tre laŭde pri la bela domo kaj

la vastaj kortoj. Efektive pasis preskaŭ tuta jaro antaŭ ol ni reiris tien. Antaŭe estis multaj formalaj farendaj. La domo estis okupita kiel armea bazo dum la militaj jaroj, kaj la armeo ne foriris ĝis post multaj monatoj.

Kia zorgo devis esti por la lernejestrino kaj stabaninoj, ke ni devis entute evakuiĝi, kaj nun ili cerbumis pri la stato de la lernejo. Kvankam ĝi situis tre proksime al Londono, bonŝance ĝi ne estis bombita, sed ĝi ne estis bone flegata. Tiuj, kiuj konis ĝin de antaŭe, konstatis diferencojn. La kortoj estis tre neglektataj kaj necesis multaj riparoj. La giganta vitra kupolo super la biblioteko estis nigrigita laŭ la milittempaj reguloj pri nigrumado. Sed al mi kaj al multaj aliaj ĝi ŝajnis gloraĵo. Tiel vasta, kaj la tereno estis vere mirinda: tenisejoj, naĝejo, eĉ labirinto je la malproksima fino, kaj tiel belegaj arboj. Oni diris ke ĉiu arbospeco en Anglio kreskas tie.

(Traduko de Trevor Steele)



Surpriza eta lando: Malto

DAVID RYAN (VELINGTONO)

Dum la kristnaska/novjara ferio mia familio kaj mi vizitis landojn en suda Eŭropo. La elstara kaj plej surpriza lando por mi estis Malto, eta lando (tri ĉefaj insuloj) inter Italio kaj Afriko.

Malto estas tre malgranda, nur 316 km², kaj unu el la plej dense enloĝataj landoj. La loĝantaro estas proksimume 450 000. Jen interesa fakto: malta estas la nacia lingvo kaj unu el la oficialaj lingvoj de la Eŭropa Unio (EU). Kvankam ni ne scias kiom da homoj parolas Esperanton,

ŝajnas ke devas esti pli ol 450 000, ĉu ne? Tiukaze, pli da homoj parolas Esperanton ol oficialan lingvon de la EU!

Ekde la frua 19-a jarcento ĝis sendependiĝo en 1964, Malto estis brita kolonio kaj, pro tio, la angla estas ankaŭ oficiala lingvo. Laŭ tio kion mi vidis, la malta kaj angla aperas egale en butikoj, stratoj, aŭtobusoj ktp sed la lingvo kiun mi aŭdis ĉie estis la malta. Krome, multaj homoj en Malto ankaŭ parolas la italan lingvon. En la televido mi vidis nur stultajn



Valeto, ĉefurbo de Malto



Bela strato en la antaŭa mezepoka ĉefurbo



Unu el multaj grandaj preĝejoj

italajn ludprogramojn! Italio estas la plej grava najbara lando laŭ komerca vidpunkto kaj Romo gravas ankaŭ pro la fakto ke Malto estas tre romkatolika lando kun grandaj katedraloj kaj preĝejoj en preskaŭ ĉiuj vilaĝoj.

Do, kion fari en Malto? Mi volis viziti Malton ĉar mi interesiĝas pri historio kaj tie estas multaj belaj, malnovaj konstruaĵoj. La malnova ĉefurbo, Mdina, estas bela mezepoka urbo kun granda ĉirkaŭmuro.

La pejzaĝo estas ankaŭ tre bela. Ni faris rondvojaĝon en aŭtobuso kaj ni vizitis ĉarman vilaĝon kie ni manĝis en bela restoracio apud la maro. Ni restis en hotelo proksima al la ĉefurbo, Valetto, kaj ni promenis ĉiutage laŭ la marbordo kie ni manĝis glaciaĵojn ktp. En frua januaro la temperaturo je tagmezo estis proksimume 15 gradoj.

Oni diris ke en somero la vetero estas terure varmega. Krome, eblas sportumi kaj fiŝkapti en la maro kiu ĉirkaŭas Malton.



Malta kamparo

Bela vilaĝo apud la maro



Kial mi iĝis esperantistino kaj kial mi amas verki kantojn en Esperanto

SUZANNE PALMER-HOLTON (MELBURNO)

Iun tagon mia filino kaj mi troviĝis en vendejo de fremdlingvaj libroj. Mia 12-jara filino baldaŭ iros al Hungarujo kun infanĥoro kaj diris al mi ke ŝi volas lerni la hungaran lingvon. Mia sperto de la hungara lingvo estis pere de mia tre amata hungara piano-instruisto kiu diris al mi ke ŝia lingvo estas tre malfacila por lerni.

Mi proponis ke mia filino lernu Esperanton anstataŭe ĉar mi aŭdis ke ekzistas aktiva Esperanto-movado en Hungarujo. Mi aĉetis por ni libron “Instruu al vi mem Esperanton” kaj dum unu horo sur la vagonaro vojaĝante hejmen, ni jam povis interŝanĝi sufiĉe multajn bazajn frazojn. Mia filino estis impresita! Ĝi estis multe pli facila ol la sinhala lingvo kiun ŝi studis! Do, patrino, patro, kaj filino komencis ĉeesti la kunvenojn de la Melburna Esperanto-Asocio. Ni trovis tie aktivan kaj tre amikeman grupon. Dum la turniro en Hungarujo, limigita al juna grupo, mia filino ne parolis multan Esperanton, sed ŝi havis iom da ŝanco por uzi ĝin.

Kiel mi skribas kantojn en Esperanto? Mi verkadis muzikon ekde kiam mi komencis formalajn muziklecionojn je la aĝo de 9 jaroj. Sed ekde kiam mi lernis Esperanton mi neniam penis skribi kantojn en ĉi tiu nova lingvo. Mi komponas muzikon ĉefe por gejunuloj - ĥorarojn/ĥorajn pecojn kaj edukon materialon uzante la Kodály-metodon de muzikinstruado kiu instruas profundan muzikan alfabetadon el

la frua komenco de la muzikedukado de infano. Unu el la avantaĝoj skribi muzikon por infanoj estas la fakto ke mi povas ilustru la kantojn per malgrandaj desegnaĵoj kiujn mi amas krei. Mi heredis de mia patro deziron desegni ĉi tiujn malgrandajn bildojn.

Kiam mi volas meti muzikon al poemo, mi komencas legi ĝin kaj post mallonga tempo la muziko estas tie. Mi certas ke la tialo estas la fakto ke mia patrino legis al mi lulhistorietojn kaj, kiam poemo aperis en la rakonto, ŝi ĉiam kantis ĝin anstataŭ legi ĝin. Mi penas konservi mian muzikon tre simpla, sed certigante ke ĝi estu plaĉa por ludi kaj aŭdi.

Do kiel ĝi funkcios en Esperanto? Kiam mi komencis lerni la lingvon mi trovis ke ĝi ne estas tiom glata kiom la angla, sed kiam mi pli bone konatiĝis kun la lingvo, mi trovis ke tiu karakterizaĵo malaperis. En 1996 unu el la membroj de la Melburna Esperanto-Asocio tre afable pruntis al mi belan libreton de poezio por infanoj verkita de nov-zelanda poeto, Bertram Potts. Dum mi komencis legi tra liaj poemoj, mi sorĉiĝis. Tiom simplaj kaj tiom kanteblaj!

Mi amus esti renkontinta lin, sed bedaŭrinde li mortis en 1994, du jarojn antaŭ ol mi malkovris lin.

Mi trovis ke, kiam mi elektas poemon por krei kanton, plej bone estas elekti poemon kiu estas mallonga. Partoj de ĝi povas ripetiĝi kreante komfortan

6. La sablokastelo

Vortoj: Bertram Potts

Muziko: Suzanne Palmer-Holton

Martiale ♩ = 100

The musical score is written for voice and piano. It consists of three systems of staves. The key signature has two sharps (F# and C#), and the time signature is 4/4. The tempo is marked 'Martiale' with a quarter note equal to 100 beats per minute. Dynamics include *mf* (mezzo-forte), *f* (forte), and *mp* (mezzo-piano). The lyrics are in Esperanto and describe a castle on a cliff.

System 1:

Vocal line: *mf*
Sur la o-ra sab-lo de la su-na bor-do ve-re

Piano line: *f*

System 2:

Vocal line: *mp*
be-lan kas-te-le-ton mi sta-ri - - gis kun lev-pon-to, fo-so kaj e-ni-ra

Piano line: *mp*

System 3:

Vocal line: *mp*
por - - do-- kaj por te-ni for la ma-ron, mi ĝin di-gis.

Piano line: *mp*

© 1997 Suzanne Palmer-Holton

LA SABLOKASTELO

1. Sur la ora sablo de la suna bordo
vere belan kasteleton mi starigis
kun levponto, foso, kaj enira pordo --
kaj por teni for la maron, mi ĝin digis.

2. Sed atingis ĝin la ondoj, do, persiste
mi senspire la kastelon rekonstruis,
ĝis la atakanta akvo batis piste
kaj pecige ĝin subfosis kaj detruis.

3. Do, mi fosis citadelon for de l'ondoj --
nerompebla bastiono mi ĝin kredis! --
kun ĉefturo kaj remparoj kaj rotondoj,
sed forlavis ĝin la maro -- kaj mi cedis!

THE SANDCASTLE

On the golden sand of the sunny shore
I built some truly beautiful castles
with a drawbridge, moat and gate
and to keep back the sea, I built a dam.

But the waves reached it, so, persisting
I breathlessly rebuilt the castle,
until the attacking water hit it brutally
and crushingly undermined and
destroyed it.

So, I dug a citadel away from the waves --
I believed it an unbreakable bastion! --
with a main tower and ramparts and rotundas,
but the sea washed it away -- and I gave up.



“Ah, mi aŭdis tion antaŭe”-momenton, kiel subkonscie renkonti malnovan amikon denove. Ĉi tiu estis unu el la kriterioj kiam mi komencis elekti la poemojn de Bertram Potts.

Se estas tro da linioj, la kanto emas iĝi pli kompleksa kiam aldoniĝas pli da muzika materialo, kun la risko ke ĝi iĝos teda muzika materialo. Tamen iuj poemoj kun kelkaj versoj ankoraŭ funkcias bone kiam ekzistas bona dinamika gamo kaj la kantoj kantatas esprimplene.

Kompreneble mi elektis la pli mallongajn poemojn, komencante per Mi Krias: Hura, Pluvonubo, La Ligna Lulĉevalo, Ŝafideto, Se Nur mi Estus Rubekolo, kaj La Sablokastelo. Mi kreis

libron de ĉi tiuj ses kantoj kaj portis ilin al mia unua Internacia Kongreso en Adelajdo en 1997. Mi poste verkis kantojn por multaj aliaj poemoj liaj, sed mi preskaŭ atingas la punkton en kiu la ceteraj estas tro longaj por fari el ili kantojn taŭgajn por esti kantataj de infanoj.

Post la kongreso kelkaj el la kantoj registratis kaj ludatis en la loka Esperanto-radiostacio 3ZZZ. Ni nun esperas produkti KDon de ĉiuj kantoj de Bertram Potts kiujn mi verkis ĝis nun. Ili kantatos de mia filino kaj mi esperas ke la aĉkompanisto estos la pianisto de ŝia ĥoruso kiu iris al Hungarujo.


Literatura ŝtormo en Esperantujo: la eldono de 'Hamleto' de Len Newell

CHARLES STEVENSON (ADELAJDO)

Len Newell ja estis eminenta Esperantisto. Li multe laboris en la Brita Esperanto-Asocio. Inter aliaj aferoj li estis la ĉefredaktisto de 'International Language', administranto, kaj sektretario de la Londona Esperanto-Asocio. Do, li intime konis la Esperantan movadon. Plue, el liaj verkoj, la noveloj 'Bakŝiŝ' estas bela ekzemplo de elstara Esperanto.

Post la dua mondmilito Len Newell migris Aŭstralien kaj ekloĝis en Adelajdo. Tie li verkis disputeble la plej ambician verkon kiu iam elvenis el Aŭstralio. Tiu estis la traduko de 'Hamleto' de Shakespeare. Nu, kial traduki 'Hamleto' kiam la Majstro mem, Zamenhof, jam ĝin tradukis? Ŝajne, Newell tiel trempis sin kiam li instruis 'Hamleto' en altlernejo ke traduko vokegis lin. Samtempe li kredis ke li malkovris erarojn en la Zamenhofa traduko. (Zamenhof tradukis el la jam tradukita germana, sed Newell konis la verkojn de Shakespeare en la origina angla lingvo.) Do, verki novan tradukon iĝis la pasio de Newell. Plurfoje, dum la tuta semajno, li laboris mense pri precize tio kion signifis metaforo de Shakespeare.

Tamen, Newell pekis! Verŝajne nepardoneble! Li, kiu ĵuris "ke ne ekzistas pli granda kaj sincera admiranto de Zamenhof," aŭdacis verki alian tradukon de 'Hamleto', implica kritiko de la Majstro. Ĉu tia kritiko venas de malliberala pensado? Ĉu egala impliko estas kial ne traduki por la aktuala generacio? En tia kadro



unu traduko ne estas pli bona ol la alia.

Nepardoneble tamen ĉar kreigiĝis post la dua mondmilito vera kulto Zamenhofa kiu ne volis konfesi ke eĉ erareton li faris.

Do, eldono de la Newella 'Hamleto' kaŭzis ŝtormon en la Esperanta mondo. Du eminentuloj, Reto Rossetti kaj William Auld, severe kritikis la tradukon. Ŝajnas ke Auld nur sekvis Rossetti.

Kial Rossetti koleriĝis pri la nova traduko? (Rossetti, kompreneble, verkis laŭdindan tradukon de 'Otelo'.) Newell kredis ke Rossetti "venĝadas sin ĉar mi ne volis submetiĝi al liaj ideoj." Daŭris Newell: "La esenco de la konflikto estis jene: Rossetti insistas ke oni devas verki la tradukon, kiel Shakespeare estus verkinta originale en Esperanto, se li estus hodiaŭa Esperantisto." Newell insistis ke tio estas absurdaĵo! "Ni devas redoni kun la maksimuma fideleco tion kion Shakespeare efektive diris."

Oni bezonas kritikojn de senpartiaj uloj kiuj nek laŭdos pro bonkoreco nek mallaŭdas pro antaŭjuĝo.

Mi proponas ke oni legu 'Hamleto, Princo de Danujo' de Newell (Stafeto 1964) kaj eltrovi siajn proprajn kritikojn.

Forlaso

TERRY MANLEY (NOVSUDKIMRUJO)

Ĉu forlasi? Forlasi! Oni forlasas la kvazaŭ longan dormon en la utero por vekiĝi al brua, malvarma mondo. Oni forlasas la dolĉan mamlakton por engluti fremdan manĝaĵon. Oni forlasas la senzorgecan de la patrino domo por alfronti memstarecon en freneza mondo. Aŭ ĉu?

Evitante enplektiĝon en tia mondo Petro jam forlasis 'sekuran' laboron. Elrigardante la fenestron de la 23a etaĝo de sia laborejo li ne povis imagi ontan vivon tie. Ĉirkaŭ li estis ekzemploj de maŝinuloj senpense ripetadantaj la taskojn de la tago, kaj li ne volis pripensi restadon tie. Semajnon antaŭan li revenis de vojaĝo en Nov-Zelando. Laŭ kvietaj kamparaj vojoj, en arbaroj majestaj, apud riveroj kaj lagoj menstrankviligaj li revigliĝis. Sed nun el la 23a etaĝo la kontraŭo frapis lin. Bruego kaj fumaĉo de aŭtoj, griza betono, nigra gudro, la tien-reena kurado de formikaspekaj homoj. Jes forlasu! Do li forlasis.

La najbaro ne komprenis. 'Kial via filo forlasis tian bonan sekuran laboron?' La patro ne komprenis. Ĉu vi membriĝis al la Harikriŝnanoj? Nur la patrino dorlotis sian amatan filon kaj ne entrude demandis pri decidoj de sia filo.

Li forlasis la aŭton, fordonante ĝin al la patro. Petro estis juna kaj energiplena kaj li rekaptis la ĝuon de knabo biciklanta rapide malsupren kaj forte grimpante la deklivojn. Li laboris kiel poŝtliveristo por iomete enspezi kaj repagi ŝuldon. Liveri per biciklo en antaŭurbo kun belaj ĝardenoj multe pli plaĉis ol tede labori en tia betona

tombo en la urbocentro.

Li forlasis la cigaredojn. Ne facilis spiri ekzercante surbikikle kaj la kosto estis evitinda. Li forlasis la alkoholon. Ĝi difektis la ĝuon de la mateno kaj ja mankis mono. Socie li pli izoligis. Amikoj emis frekventi la trinkejon vespere. Do liaj dumtagaj kontaktoj kun ili estis maloftaj, ĉe plaĝoj aŭ dum piknikoj. Kun la amikino, Ĝajn, li biciklis, promenis, kaj foje festumis. Kvankam Ĝajn esprimis amon al li, ŝia patrino komencis dubi pri la rezulto de la rilato. Kaj li mem ne povis bildigi estontan familian vivon kun iu ajn. Forlasi amikino estus korŝira afero, sed post longa prokrasto de foriro-reveno, ĝi okazis. Ĝajn ne plu povis toleri kaj trovis aliulon. Forlaso!

Petro okupiĝis kaj mane kaj mense. Paginte la ŝuldon li ne plu laboris enspezante. Li farbis kaj riparis la patrinan domon. Li prilaboris la ĝardenon, kuris, naĝis, kaj multe biciklis. Li legis pri plantoj, ĝardenoj, medio, budhismo, kaj pacismo. Tiel li sufiĉe kontentiĝis. Por nutri la soifon al naturo li foje forbiciklis dum tagoj, semajnoj. Tio refreŝigis lin por daŭrigi la hejmvivon.

Iam li biciklis okcidenten kelkcent kilometrojn kaj revenis. Dum longa vojaĝo suden al ĉefurbo li mem devis provizore ripari la biciklon por daŭrigi la vojaĝon. Unu grava parto paneis. Ĝi estis la malantaŭa portilo por liaj sakoj. Ĝi rompiĝis pro la pezaj sakoj kaj li sciis ke ĝi ne plu taŭgis por liaj vojaĝoj.

Reveninte hejmen li sekvis konsilon de amiko kaj iris al la fabrikejo de Ĝim,

kiu fabrikis biciklojn. Ĝim fabrikis por li nerompeblan portilon je ne alta kosto sed proponis al Petro ke li povis labori por pagi. Tiel Petro povos lerni pri bicikloj kaj samtempe iomete enspezi. Do jen nova etapo en la vivo de Petro.

Ĝim estis genia ĉionfarulo. Ne nur biciklojn li prilaboris sed ankaŭ ĉaretojn, velboatetojn, kanutojn, muzikilojn, kaj preskaŭ ĉion kion li aŭ konatoj bezonis. Petro lernis munti kaj ripari biciklojn dum Ĝim veldis la tubojn por fabriki biciklajn kadrojn. Plaĉis al Petro industrie labori kun ulo de ŝajne senlima energio, kiu kvazaŭ magie aperigis produktaĵojn post unu tago. Sed foje la bruo, odoraĉo, kaj sennatureco de la fabrikejo kaj la kvartalo en kiu ĝi situis subpremis lin kaj li deziris eskapi. Kvankam plaĉis al la ĝardeno de la patrino domo, tio ne sufiĉis kaj li serĉis la senlimecon de la nepriloĝataj regionoj. Arboj, riveretoj, montetoj, rokformaĵoj, kaj stelplena ĉielo allogis lin. Kaj ek! Li forlasis.

Vojaĝo portis lin suden ĝis la limo de la landmaso. Estis kvazaŭ li strebis eskapi ion en si mem. Ĉu pli fora distanco malpliigus la allogon al amikino, cigaredo, biero, kaj ĉia tento de sia pasinteco? En nekutima vivo envenis ia rutino. Inter urbego kun fabrika laboro kaj kampara urbeto en la plej suda parto de la lando, kie li prilaboris pomarbejon, lia vivo balanciĝis. Kaj tiel plu dum kelkaj jaroj ĝi daŭris. Sed fino venas al ĉiu kutimo. La pomproduktejo ne prosperis kaj bienistoj elsarkis la arbojn. Ĝim trovis pli konstantan muntiston por sia bicikla entrepreno.

Forlasi? Kion? La vivo de Petro iĝis iom sencela. Li vagis norden al bieno de amiko sed pro droĝkulturo li ne sentis sin parto de la grupo. Antaŭ jaroj li forlasis eksperimentadon en tia

mondo. Inter tiuj vojaĝoj li ankoraŭ revenis al la patrino domo. Pro manko de mono kaj laboro enspeziga, li ne povis pagi lukostojn en la urbego. La patrino ne plendis. Ŝi ankoraŭ amis la filon kaj aprecis la helpon en la ĝardeno kaj ĉirkaŭ la domo. Sed ŝi iom ĝeniĝis pro la soleco de sia amata filo.

Je iuj periodoj Petro subiĝis al tia soleco. Li ne deziris kontakton kun homoj. Li ne deziris loĝi en ĉi tia mondo de frenezuloj. Sed en tiuj periodoj li komencis pridubi sian mensosanecon. Deprimiĝo. Senlumo. Nigro. El tia stato li ne povis imagi finon de ĝi. Tagon post tago li dormis. Ne deziris vekiĝi. Senenergia laciĝo envolvis lin. Volo mankis.

Je la momento kiam li sentis tiom nekapabla elgrimpi tian abismon, li vekiĝis kaj rekomencis la kutimojn de la alia Petro. Meditante, ekzercante, sanprizorgante. Neniu krom la patrino suspektis ke io estas misa je Petro.

Forlasu! La domon! Survoje estis la devo daŭrigi energie. Ne estis la komforto kaj ebleco pigri. Do refoje li zorge dismuntis kaj remuntis la biciklon kontrolante kaj oleante ĉiun parton. Li purigis kaj poluris la ledajn sakojn kaj enpakis tendon, dormsakon, kuirilojn, vestojn kaj manĝaĵon. Vojpreta li adiaŭis la patrinon kaj forlasis.



Petro revigliĝis en la bela kamparo de Nov-Zelando



New Zealand Esperanto Association

P.O. Box 8140
Symonds Street
Auckland 1035
New Zealand

www.esperanto.org.nz
nzea@esperanto.org.nz
0800 350 781

Bradley McDonald | President

Ivan Pivac | Vice-President

Chris Krageloh | Secretary

Dave Dewar | Assistant Secretary

David Ryan | Treasurer

Committee Members:

Erin McGifford

NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, and answering queries about the language.



Australian Esperanto Association

Esperanto House
143 Lawson Street
Redfern NSW 2016
Australia

www.esperanto.org.au
info@esperanto.org.au
+61 (07) 4696 9293

Sandor Horvath | President

Jonathan Cooper | Vice-President

Heather Heldzingen | Treasurer

Esther Parris | Secretary

Committee Members:

Terry Manley, Indrani Beharry-Lall

AEA was established for the promotion, education and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto organisations with similar aims.

WHAT IS THIS?

Perhaps you've picked up this magazine by chance and you're wondering, what is this language? It looks like Spanish, doesn't it? But it's not, and it's not Klingon either. This magazine is written in Esperanto. Have you ever heard of Esperanto? Where is it spoken?

Esperanto is a planned language. It's not the official language of any country, but it's spoken in over 100 countries across the world. It's designed to be a second language that everyone can speak. So, if you come across someone from Mexico or Taiwan, you don't have to speak Spanish or Chinese, and they don't have to speak English to you. If everyone spoke Esperanto, we could talk together in Esperanto as equals and we wouldn't have to learn so many languages.

Esperanto is an easy language. Its grammar is regular. It can be learned in much less time than other languages. Have a look inside this magazine – you'll probably be able to make out a few words or get a general sense of some sentences. You can learn Esperanto on the net (we recommend lernu.net or duolingo.com), or from a book, or come to one of our meetings throughout Australia and New Zealand. Also go onto YouTube or Wikipedia. You'll find lots of material there in and about Esperanto.

What can you do with Esperanto once you've learnt it? Well, the world is your oyster. Get in touch with other people who speak Esperanto – chat with them online or go to a congress or cultural event. Even if you stay at home, there are hundreds of books and magazines either written in Esperanto or translated from other languages. There are music CDs, radio broadcasts, even films in Esperanto. People with similar interests who speak Esperanto also get together, such as cyclists, doctors, Rotarians, or coin collectors. There are plenty of opportunities to use Esperanto to communicate with other people throughout the world.

Esperanto will open the world to you – beyond our usual English-language confines.

Interested? See the contact details on the inside back cover.